

HORIZONTO

*KULTURA KAJ INFORMA REVUO
DE LA NEŬTRALA ESPERANTO-MOVADO*

10-a Jaro N-ro 57 (3)
Majo-Junio 1985



POR AKTIVA NEŬTRALECO

NATURAJ LEĜOJ DE LA ESPERANTISMO

TREZORO DE LA MUZEO DE METZ - LA KONFERENCA URBO

LINGVA ANGULO: KIO ESTAS KOMUNA PASPORTO?

HORIZONTO

KULTURA KAJ INFORMA REVUO
DE LA
NEŬTRALA ESPERANTO-MOVADO



Dumonata oficiala organo de la INTERNACIA
CENTRO de la NEŬTRALA ESPERANTO-
MOVADO (ICNEM).

Eldonata kaj presata de
ELDONEJO PERSPEKTIVO.

Redakta Komitato: Salvador Gumà, Ivo
Lapenna, Jean Thierry.

Adreso de la redakcio kaj administracio:
ELDONEJO PERSPEKTIVO, Nørregårds-
vej 91, DK-2610 Rødovre, Danio, kiu
prizorgas la distribuon de la artikoloj
kaj aliaj tekstoj al la respondecaj mem-
broj de la Redakta Komitato. La redak-
cio rezervas la rajton mallongigi la
tekstojn kaj korekti la lingvon konforme
al la Fundamento de Esperanto.

Abonojn akceptas la perantoj de HORIZONTO
aŭ rekte la ELDONEJO PERSPEKTIVO,
Nørregårdsvej 91, DK-2610 Rødovre, Danio.
Poŝtĉekkonto: Kopenhago 9 32 95 95.

Jara abono por ĉiuj landoj: 100 danaj kronoj
aŭ ronda egalvaloro. Tiu abono ne inkluzivas
membrecon de ICNEM. Vidu la antaŭlastan
kovrilpaĝon.

Por recenzo bonvolu sendi 2 ekzemplerojn, por
mencio 1 ekzempleron de libro aŭ broŝuro.
HORIZONTO akceptas ankaŭ anoncojn.

ENHAVO

Por Aktiva Neŭtraleco (I.L.)	53
Altaĵ Honorigoj por Prof. D-ro Régulo Pérez (Ivo Lapenna)	54
Humanismo de Esperanto (Prof. Juan Régulo-Pérez)	55
Naturaj Leĝoj de la Esperantismo	57
Trezoroj de la Muzeo de Metz (Eugène de Zilah)	58
Novaĵoj pri Akademio Internacia de Scienco (AIS)	61
Amnestio Internacia (Feiko Munniksma)	62
Saĝaj Vortoj pri Saĝo kaj Malsaĝo (Peter Zach)	63
Beletro (Bernard Aunis, Theodor Storm/ Guido Holz, Antoni Isern/S. Gumà, Marjorie Boulton)	64
Originala Verkaro (L.L. Zamenhof)	67
Lingva Angulo (I.L.)	68
Presajtoj por la Jubilea Jaro 1987	69
Leteroj	70
El niaj Organizaĵoj	71
Libroj Sub La Lupeo	72
Mallonge	74

Frontpaĝa bildo: Lige kun la 11-a Internacia
Konferenco de N.E.M. en Metz oni havos la
unikan ŝancon viziti la grandegan ekspozicion
(14.05-02.09.85) kun 140 pentraĵoj de la
mondfama franca pentristo, Auguste Renoir,
en "Grand Palais" en Parizo. La sama ekspozicio
ĵus estis en Londono, kie ĝi havis ekster-
ordinare grandan sukceson. - En Parizo aldo-
niĝas ankoraŭ du pentraĵoj, nome du el liaj
plej famaj: "Lunĉo" kaj La Danco en "Moulin
de la Galette" (v. la frontpaĝon). - "La plej
impona ekspozicio en Parizo en la lastaj 50
jaroj" skribas la gazetaro.

PERANTOJ

Aŭstrio:

D-ro Klaus Perko, Lendkai 111, A-8020
Graz. Pĉk. Graz 1257.845. Jarabono: 23o ŝil.

Britio:

Geoffrey King, 228, Capworth Street,
London. Elo 7HL. Pĉk. 37.507.9106.
Jarabono: 7 anglaj pundoj.

Danio:

Eldonejo Perspektivo, Nørregårdsvej 91,
DK-2610 Rødovre. Pĉk. 9 32 95 95 Jarabono:
100 d.kr.

Francio:

Marie Thierry, 5 rue Léon Cogniet, F-75017
Paris. Pĉk. 191707 Z Rennes Jarabono: 100
f.fr.

FR Germanio:

Rudolf Helmke, Wiesenstrasse 9, D-4773
Möhnesee-Günne. Konto Nr. 31 377 450
Sparkasse Möhnesee (BLZ 414 514 85)

Jarabono: 30 DM

Grekio:

Adda Sakellaroupoulou, Aghias Paraskevis
30, Ateno 816. Jarabono: 100 d.kr.

Hispanio:

Luis Hernández-Yzal, Banca Mas Sarda:
19000 669/2, Vilafranca del Penedès
(Barcelono), Avenda de Barcelono 35.
Jarabono: 1300 pesetoj.

Israelo:

Faklieru Aviv, IL-58410, Holon, D.Elazar 3,
Tel Aviv. Jarabono: 100 d.kr.

Italio:

Enrico Mingo, Via Simone Martini, 22, Isolato
19, I-80128 Napoli. Jarabono: 17000 liroj.

Jugoslavio:

Prof. D-ro Oton Pancer, Dom Lavoslava
Svarco, Bukovačka cesta 55, Yu-41000
Zagreb. Tekući račun: Zagrebačka banka
30101-620-16-012106. Jarabono: 800 din.

Luksemburgo:

Albert Wickler, 1 rue de Kehlen, L-Olm.
Pĉk. 54175-49. Jarabono: 100 d.kr.

Nederlando:

Marianne Vermaas, Nieuwe Binnenweg 70,
I.R. 3015 BC Rotterdam. Pĉk. 333790.
Jarabono: 36 n.gld.

Svedio:

Gösta Persson, Buntmakaregatan 1, S-25248
Helsingborg. Ĝirkonto: 434 1664-3. Jarabono:
100 d.kr.

El ĉiuj aliaj landoj oni pagu al la
Administracio aŭ al unu el tiuj perantoj, ĝis
peranto en tiu lando estos trovita.

GRAVA RIMARKO: Oni akceptas abonojn nur
por la tuta kalendara jaro.

POR AKTIVA NEŬTRALECO



Sur p. 57 de tiu ĉi n-ro *Horizonto* donas adekvatajn respondojn al du el la "naturaj leĝoj de la esperantismo" laŭ *La Brita Esperantisto (BE)*. La "leĝo" de *BE* pri la "fina venko" kaŝas la veron, dum tiu pri "neŭtraleco" inversigas ĝin konforme al la oficiala sovetiisma slogano, duoble malvera, pri la "progresema komunismo" kaj la "reakcia kontraŭkomunismo". Fakte, tute ne temas pri komunismo, sed pri sovetiismo, kiun ankaŭ multaj sinceraj komunistoj, socialistoj, anarkiistoj k.a. malaprobas. Tial ankaŭ ne temas pri kontraŭkomunismo, sed pri eventuala kritika rilato al sovetiismo. Tiom nur por konstati faktojn kaj eviti miskomprenojn, certe ne por enkonduki politikajn diskutojn en nian partipolitike neŭtralan organon.

Tamen, ĉar tiu politika slogano de "kontraŭkomunismo" - mensokapta en iuj medioj kaj timiga en aliaj - nun estas intence disvastigata en la *Esperanto-Movado*, ni ne rajtas silenti. Tial ni plian fojon eksplicite kaj plej firme deklaras:

Ni rezistis la naziisman misuzon de la neŭtrala Esperanto-Movado en la tridekaj, la reakcian makartisman misuzon en la fruaj kvindekaj, kaj ekde 1974 ni rezistas la sovetiisman - la plej danĝeran, ĉar apogatan de ekstere - en ĉiuj poroj de la strukturo de UEA mem. Ni agas absolute same en rilato al kiu ajn alia partipolitika misuzo eĉ se temus pri demokrata partio, ĉar ni defendas la propran, humanecan identecon de la esperantismo kaj la sendependecon de la neŭtrala Esperanto-Movado, t.e. ĝian imunecon kontraŭ kia ajn partipolitika influo aŭ eĉ superrego. Tio estas la kvintesenco de aktiva neŭtraleco distinge de la senprincipa pasiva, kiu adorsterniĝus eĉ antaŭ la trojan ĉevalon kaj enlasus ĝin, se ĝi surhavis ŝildeton kun "bonan tagon!" en Esperanto. Aŭ eĉ sen tia ŝildeto.

Tio estas unu afero.

Tute alia afero estas la nekontestebla rajto de ĉiu individuo apogi aŭ kontraŭbatali sovetiismon, komunismon, socialismon, konservativismon aŭ kiun ajn alian politikan partion aŭ doktrinon, kaj la rajto lukti por siaj politikaj konvinkoj uzante laŭdezire ankaŭ Esperanton por tiu celo, sed ekster la organizitaj strukturoj de la neŭtrala Esperanto-Movado. Tiun kaj ĉiujn aliajn rajtojn kaj fundamentajn liberecojn laŭ la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj ni postulas por ĉiuj. Kaj tio, siavice, estas esenca parto de humaneca internaciismo, nedisigeble ligita al la Internacia Lingvo.

ICNEM kaj *Horizonto* plu flegas la saman principon de aktiva neŭtraleco, kiun UEA rigore aplikis en la periodo 1947-1974 observante sian tiaman Statuton, kaj kiu ebligis fortikigi la Asocion interne kaj respektigi ĝin en la ekstera mondo. Se iuj kontraŭas tiun principon, do ili diru tion aperte kaj laŭplaĉe kritikigu ĝin, sed ne inventadu ian "kontraŭkomunismon" aŭ kian ajn alian "kontraŭ-ismon" por pravigi sian partiecon aŭ, en la plej bona okazo kaj plej milde dirite, sian pasivan neŭtralecon.

(Daŭrigo sur la sekvanta paĝo)

ALTAJ HONORIGOJ POR PROF. D-RO RÉGULO-PÉREZ

Al unu el la plej elstaraj esperantistoj, Prof. D-ro Régulo-Pérez, estis faritaj eksterordinaraj omaĝoj okaze de lia pensiigo kiel profesoro en la Fakultato pri Filozofio kaj Literaturo en la Universitato de La Laguna, Tenerife, Hispanio. Inter alie Prof. Régulo estas membro de la Akademio de Esperanto kaj fondinto de la Eldonejo *Stafeto*, kiu, dank' al liaj kompetenteco kaj sindona laborego, riĉigis nian literaturon per tiom da elstare valoraj verkoj en pluraj serioj. Dum pluraj jaroj - en la hispana periodo - li estis kunredaktoro de nia *Horizonto*, kaj li restas fidela apoganto de ĝia humaneca linio. Al liaj iniciato kaj laboro ŝuldiĝas ankaŭ la oficialaj kursoj de Esperanto (Lingvo kaj Literaturo) en la Instituto pri Lingvoj de la Universitato de La Laguna. Dum plenaj 18 jaroj li instruis tie. Espereble li daŭrigos la instruadon ankaŭ post la pensiigo.

Pro liaj meritoj la Urbestro de La Laguna atribuis al li la Honoran Titolon "Adoptita Filo de la Urbo La Laguna". La 26-an de oktobro estis inaŭgurita urba placo je lia nomo. Ĝi nu estas "*Plaza Doctor Juan Régulo Pérez*". La solenajn partoprenis membroj de la urba administracio, universitataj kolegoj kaj amaso da aliaj personoj. La urba bando ludis plurajn muzikajn punktojn. La gazetaro abunde raportis kaj emfazis ankaŭ la grandajn meritojn de la distingito por Esperanto.

En januaro 1985 la Urba Administracio kaj la Universitato de La Laguna eldonis 70-paĝan festlibron, en kiu estas priskribitaj la solenaĵoj. Ĝi enhavas ankaŭ la oficialajn paroladojn, inter kiuj troviĝas la prelego "Esperantismo" de Prof. Régulo mem. Sube ni publikigas parton de tiu prelego en traduko de nia kunlaboranto Hugo Röllinger. Ankaŭ la fotoj estas faritaj de li.

ICNEM kaj *Horizonto* tre ĝojas pro tiuj meritaj honorigoj de Prof. Juan Régulo-Pérez kaj aldonas siajn plej korajn gratulojn kaj varmajn bondezirojn por lia ankoraŭ tre longa aktivado sur lingvosciencia kampo kaj por lia plua laboro por la esperantismo, kiu, laŭ liaj propraj vortoj en la prelego, egalas al "nova humanismo".

(Daŭrigo sur la sekvanta paĝo)

Ivo Lapenna

POR PACO EN LIBERECO - POR LIBERECO EN PACO

POR AKTIVA NEŬTRALECO (Daŭrigo)

Ni en ICNEM kaj ĉirkaŭ *Horizonto* plu klopodos rekonstrui tiun preskaŭ finkonstruitan ponton, kiun la aliaj senrespondece, senalternative kaj ege malutile por Esperanto eksplodigis en 1974. Tion montras ankaŭ niaj ripete faritaj proponoj digne celebri la Jubilean Jaron per komunaj fortoj surbaze de bone pripensita, realeca kaj konstrua agadprogramo. La reprezentantoj de UEA ne nur fine rifuzis eĉ pridiskuti la prezentitan komunan Agadprogramon, sekve ankaŭ la proponon mem, sed eĉ prisilentis nian iniciaton kaj la tutan aferon antaŭ la membraro kaj tre verŝajne ankaŭ antaŭ la Komitato, kiel indikas la plena neinformiteco de pluraj el la komitatanoj. Plian fojon la respondecon pro la fiasko kaj ĝiaj sekvoj en 1987 portas la faktaj gvidantoj de UEA.


Ni faris kaj plu faros ĉion eblan en nia povo por progresigi la disvastigadon de la neŭtrale homa Internacia Lingvo kaj por manifesti, kaj interne de la Esperanto-Movado kaj ekster ĝi, la tradiciajn kulturajn kaj ĝenerale ideojn valorojn de la partipolitike kaj religie sendependa kaj neŭtrala Esperanto-Movado, konforme al la principo de aktiva neŭtraleco.

I. L.

HUMANISMO DE ESPERANTO

Prof. Juan Régulo-Pérez

*Prof. D-ro Juan Régulo-Pérez
inaŭguranta per malkovro de unu
el la 5 Tabuloj la Placon dediĉitan
al li fare de la Urba Administracio
en La Laguna (Tenerifo) la 26-an
de oktobro 1984.*



El prelego "La Esperantismo"

Foto: Hugo Röllinger

Mia agado por Esperanto estis la kaŭzo, ke plurfoje amikoj kaj kolegoj konsilis al mi en honesta sincereco ne dediĉi miajn intelektajn kaj fizikajn fortojn tiel ekskluzive al lingva movado sen ŝancoj, aŭ almenaŭ kun tre dubindaj eseroj pri sukceso. Mi persistis. Tiel mi fariĝis defendanto de Esperanto kaj batalanto por ĝi ankaŭ en etika rilato.

Mi preferis la sintenon de tiuj, kiuj rifuzas malatente rezigni sian etikan taskon, alivorte, kiuj havas la "kapablecon" forĝi sian propran "moralan karieron" kaj, sekve de tio, formitan imagon de si mem. Neniam, same, mi cedis mian etikan konsciencon al politikaj partioj, aŭ al religiaj institucioj, aŭ al tiuj kun eduka, socia aŭ iu alia karaktero - egale kiel fascinaj ili prezentis sin al mi ĉu sur ebena demokratia aŭ pro scienca metodo - neglektante la publikan opinion kaj la kulturajn modojn, aspektoj kiuj ĉiam efemere min kapricigis kaj pasis kiel nuboj de l' somero.

Tiel Esperanto fariĝis en mi dua restadejo lingvistika, fariĝis lingvo de kvazaŭ sekundara vivo, ĉar la primara, nature, estis ĉiam la lingvo hispana.

Kaj tiel, danke al via grandanimeco, mi posedas trioblan civitanekon: tiun de Garafia, tiun de La Palma laŭ mia naskiĝo sur La Palma, kaj tiun de La Laguna. Konsekvence, do, mi havas duoblan lingvan naciecon, nome la hispanan kaj tiun de Esperantisto.

La patrujo, antaŭ ĉio la kultura patrujo - la plej aŭtentika -, ne ĉiam koincidas necese kun la geografia loko kie oni naskiĝis. Kafka, ĉeĥo, skribis germane; Conrad, polo, skribis angle; Canetti, bulgaro, skribis germane, k.s., kio signifas ke ili skribis en "adoptitaj" lingvoj. Do estus nekongruante, neĝuste, diri, ke Conrad apartenas al la pola literaturo, ke Kafka al la ĉeĥa kaj Canetti al la bulgara: elimini Conrad el la kadro de la angla literaturo kaj Kafka kaj Canetti el tiu de la literaturo germana, tio signifus perforti la realecon rilate al iliaj aŭtentikaj kulturaj patrujoj "adoptitaj".

Tiel mi realigis parton de mia personeco pere de Esperanto, kaj en Esperanto mi trovis ke la Esperantismo estas nova humanismo - kaj mi nomas ĝin "nova", por diferencigi ĝin disde la humanismo de la Renesanco (kiu estis reago kontraŭ la religia gotikismo), aŭ de la modernaj humanismoj kiel la kristana aŭ marksista aŭ pedagogia aŭ tiu de alia karaktero.

Kiel pagi abonkotizon de MONATO

MONATO havas perantojn en multaj landoj. Se vi ne konas vian peranton, bonvolu pagi rekte al la ĉefperanto, kiu estas **FLANDRA ESPERANTO-LIGO**, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio.

- Se vi havas poŝtĉekkonton, pagu la sumon de 960 Belgaj Frankoj al poŝtĉekkonto Bruselo 000-0265338-43 de Flandra Esperanto-Ligo, Antwerpen.
- Se vi havas konton ĉe UEA, pagu la sumon de 54 Nederlandaj Guldenoj al konto fela-x kaj sendu la duan folion de la ĝirilo al Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio.
- Vi ankaŭ povas sendi internacian poŝtmandaton al la sama adreso.
- Se vi ne povas uzi unu el la supre menciitaj vojoj, ekzistas la jenaj eblecoj:
 - Sendu al la menciita adreso 45 internaciajn respondkuponojn (maldekstre stampitajn).
 - Sendu Eŭroĉekon kun valoro de 1060 Belgaj Frankoj (960 por la abono kaj 100 por la bankkostoj) je la nomo de Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio.
 - Sendu ordinaran ĉekon kun valoro de 1110 Belgaj Frankoj (960 por la abono kaj 150 por la bankokostoj) je la nomo de Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio.

Por mi la humanismo esperantisma estas la tendenco al pura humaneco, en senco de absolutaj egaleco kaj justeco inter la popoloj. Aŭ, alivorte, la humanismo esperantisma estas la deziro, ke la aliaj homoj ankaŭ prosperu en akordo kun sia propra "natureco"; ĝi estas la deziro rilati kun ili, konatiĝi kun ili kaj respekti ilin en ilia tuta integreco. Tio estas eŭkaristio kun niaj proksimumoj kaj kun niaj antaŭuloj, sed sen la mistikaj aŭ magiaj rilatoj kiujn kunportas la religioj.

Kiel la Esperantista poeto Kalocsay, kiu trovis spiritan rifuĝon verkante en Esperanto kiam la Dua Mondmilito furiozis ĉirkaŭ Budapeŝto, tiel ankaŭ mi trovis en Esperanto idealon en kiu mi nek renkontiĝis kun malbonemaj mokoj nek kun sanktaj tukoj, per kiuj estis purigintaj al si la manojn post batalo iuj kredantoj. Idealon do mi trovis, efektive sen aŭreolo, sen orgojlo, idealon kvazaŭ kiel senpovan feblan orfeon, nespertan, inklinantan al malforteco kaj, probable, sen espero al futuro - sed por mi nobla idealo, blanka, senmakule pura.

En la longa nokto de la multaj jaroj, dum kiuj la diktaturo rifuzis al mi la plenajn civilajn rajtojn, ĉiam spirite akompanis min, en mia koro, kantanta kanario. Se ne estus estinte tiel, ne estus restinta io alia, ol kaŝe brilanta mensogo; sed en la amara mondo en kiun min ĵetis nia intercivitana milito kaj la postmilitaj cirkonstancoj, ĉiam restis al mi fonto de konsolo kaj aperta fenestro al freŝa aero de la libereco.

Esperanto, kiu dum longa tempo estis malestimata de la intelektuloj, ignorata de lingvistikoj, konsiderata de snoboj kun supereco, persekutata de ĉiuj diktatorecaj reĝimoj, ricevis sian kapablecon de disradiado nur pere de siaj propraj kvalitoj intelektaj kaj moralaj. Neniam ĝin subtenis potencoj de armiloj, nek postulo registara. Ankaŭ en ĉi-tiu rilato Esperanto konformas al humanisma idealo. Unu el la bazoj de l' humanismo estas la sento pri homa digno kun la volo, neniam intenci, solvi problemojn perforte. Fronte al perforto la humanismo ĉiam preferas la intelekton.

Elhispanigis: *Hugo Röllinger*

NATURAJ LEĜOJ DE LA ESPERANTISMO

En la marta-aprila n-ro de *La Brita Esperantisto* (1985), redaktata de William Auld, aperis nesubskribita teksto sub la supra titolo. Kelkaj el la "leĝoj" estas pli aŭ malpli bonaj. Unu ne trafas la esencon de la afero, dum alia estas malĝusta. Jen tiuj du "leĝoj" laŭ *La Brita Esperantisto* (BE) kaj sub ĉiu el ili la "leĝoj", kiujn *Horizonto* formulis laŭ historiaj kaj aktualaj faktoj:

ĈIAMVALIDA LEĜO DE LA FINA VENKO (laŭ BE):

La fina venko okazos morgaŭ.

La Sama Leĝo (laŭ *Horizonto*):

Pene konstruadi ponton al la celo, ĝue eksplodigi ĝin antaŭ la finkonstruo, pigre ripozi sur la rubo, rekomenci la penan konstruadon, reeksplodigi, reripozi, rekomenci, ktp. ĝis la fina venko aŭ - malvenko.

Aŭ

Tri paŝoj antaŭen, unu retropaŝo, kvar paŝoj antaŭen, kvin retropaŝoj, ktp. ĝis la paŝoj antaŭen atingos la celon, aŭ la retropaŝoj - la starton.

LEĜO DE LA NEŬTRALULOJ (laŭ BE):

Kiu ne estas kontraŭkomunisma, tiu ne estas politike neŭtrala.

La Sama Leĝo (de *Horizonto* Nomata Leĝo de Pasiva aŭ Senvertebra Neŭtraleco):

Ĝenerale: Kiu intelektu kaj emocie indiferece egaligas honestecon kaj malhonestecon, viktimo de krimo kaj krimulon, observanton kaj piedpremanton de la homaj rajtoj, demokration kaj totalismon, entute bonon kaj malbonon, tiu estas perfekta neŭtralulo (= morala senvertebrulo), kaj restos tia ĝis li/ŝi mem fariĝos viktimo de krimo aŭ persone spertos foreston de homaj rajtoj kaj totalismon. Kaj tiam estos tro malfrue.

Aparte en la Esperanto-Movado (en negativa formo laŭ la supra modelo de BE):

Kiu siatempe ne akceptis la nazitrankviligan aserton, ke Esperanto estas "nur lingvo, nenio pli", nek estis indifereca rilate la naziismajn aktivadojn kaj agojn en la Esperanto-Movado (ekz. lige kun la Kolonja Kongreso), sed aktive reagis, tiu ne estis politike neŭtrala; kiu nuntempe ne akceptas la sovetitrankviligan kontraŭsciencan aserton, ke Esperanto estas "nur lingvo, nenio pli", nek estas indifereca rilate sovetiismon (nepre distingendan disde diversaj fluoj de komunismo, je kiu multaj honestaj homoj kredis aŭ kredas), sovetiismajn kampanjojn kaj agojn en UEA, sed aktive reagis, tiu ne estas politike neŭtrala.

El humaneca vidpunkto fieri povas tiuj, kiuj ne estas "neŭtralaj" en la supraj sencoj.

(v. ankaŭ la ĉefartikolon)

ĈU VI JAM PAGIS VIAN KOTIZON AL ICNEM KAJ ABONON AL HORIZONTO?

Se jes, ni kore dankas. Se ne, ni tre petas vin fari tion kiel eble plej baldaŭ. Vi povas pagi aŭ rekte al la administracio en Kopenhago, aŭ al kiu ajn peranto laŭ la adresoj indikitaj sur la internaj kovrilpaĝoj de *Horizonto*.

VIA TUJA REAGO JE TIU ĈI ALVOKO MULTĖ HELPAS NIAN ADMINISTRADON KAJ KURAĜIGAS NIAN LABORON.



11-a INTERNACIA KONFERENCO de la NEŬTRALA ESPERANTO - MOVADO

Metz (Francio)

27. julio - 2. aŭgusto 1985

Konstanta adreso:

M. de Zilah, 39 rue Joseph Hénot, F-57070 METZ
telf. 8 765 3985 pĉk. 262033W Nancy

ĈEFTEMO: "Humaneca Internaciismo"

KONSTANTA TEMO de la pasintaj, nuna kaj proksima konferencoj:
"Renkonte al la Jubilea Jaro 1987".

BAZAJ LABORDOKUMENTOJ:

Statuto de ICNEM, Regularo de la Internaciaj Konferencoj de N.E.M., Baza (Kadra) Programo por la Jubilea Esperanto-Jaro 1887-1987.

PROGRAMO: Vidu n-ron 1/1985 de *Horizonto*

TREZOROJ DE LA MUZEO DE METZ

Bedaŭrinde mi ne povas ĉi-tie konigi ĉiujn valoraĵojn de unu el la plej modernaj kaj plej tipecaj muzeoj de Eŭropo. Ni kontentiĝu rapide priskribi kelkajn aĵojn, kiuj venigas en Metz arkeologiajn serĉistojn el la tuta mondo.


1) *Statuo helenika* de la diino egipta Izisa, kiun oni trovis sub la nuna Placo de la Respubliko, t.e. en la urbocentro, en 1841, kiam oni konstruis la Kazernon de Pioniroj. La diino estis adorata en Metz; ŝi protektadis la familion kaj la kuracistojn. Oni povas supozi influon de la Pergama Skolo pro la tre lozaj



5.

5.






4.

6.

2.



3.



3.

drapiraĵoj. Sur la manoj oni nodis la tukon laŭ simbola formo: "la Izisa nodo". La statuo estas el kalkŝtono blanka kaj altas je 170 cm. Oni malkovris tre similan figuraĵon de Izisa en Plovdivo (BG). La datumado estas malfacila, sed ĉiumaniere la ŝtonaĵo ne postas la 2-an jarcenton.

2) *Viktoria*, diino de la venko ("niké"), kun flugiloj. Statuo el regiona kalkŝtono datumita je la komenco de la 2-a jarcento, trovita en Metz en 1882. Ĝi estas repliko de antikva statuo el la familio de Viktoria de Paeonios, kiel atestas la drapiraĵoj "akvumitaj", kiuj ofte algluas la korpon; la vestaĵo: helena peplo, la granda ekmovo kvaroncirkla de la posta drapiraĵo, kiu videblas sur skulptaĵo de la Delfa Thalaso. Ĝi altas je 130 cm.

3) *Altaro de Mitrao*. Solnure ĝi valorus la viziton de la muzeo. Bedaŭrinde oni devis rekunigi la pecetojn de la Mitra-a altaro, kiun diserigis la religia fanatismo de kristanoj en 395, kiam la sanktejo de Mitrao estis sisteme detruita kaj incendiita. La granda reliefo konceptiĝis kvazaŭ arkitektura dekoro, kie la ĉefan centran scenon ĉirkaŭas mitraismaj scenetoj. Centre, Mitrao tratranĉas la gorgon de virbovo, simbolo de fekundeco kaj de nature regenerado, kies testiklojn dispinĉadas ne malpli simbola kankro.

4) *Unuaj kristanaĵoj*. Dangere konkurencis kun la egipta religio de Izisa kaj kun la mitraismo, la kristanismo aperinta en Metz ĉe la fino de la 3-a jarcento. La muzeo havas kortuŝajn memoraĵojn el tempoj, kiam la religio de Jezuo estis ankoraŭ subtera: prakristanajn krucetojn, plumban ankreton, sepultajn steleojn kun kristanaj ornamaĵoj. Metz fieras havi en sia muzeo la unuan kristanan tomboŝtonon de Francio, tre disfrakasitan, sur kiu tamen oni povas legi: HIC QUIESCIT CASTORIUS QUI VIXIT AN(nos) PL(us) M(inus) LX (ĉi-tie ripozas Kastorio, kiu vivis ĉ. 40 jarojn). Ĝi datumas de la fino de la 4-a jarcento. Multe pli kortuŝa, kaj grafike pli bela, estas la steleo de 3-jara infano Paŭlo: HIC IACET PAULUS QUI VIXS(it) ANNUS III DI(es) XLY (ĉi-tie kuŝas Paŭlo, kiu vivis 3 jarojn kaj 40 tagojn).

5) *La kancelo de Sankta-Petro* de la Monahinoj, preĝejo kristana, kiu reutiligis murojn de romia baziliko kaj kiu estas la plej antikva sankta preĝejo videbla en Francio, nun estas en la muzeo. Ĉi-tiu barilo el ŝtono, gravurita misplate, t.e. tiel ke la nunaj planoj estas pli kunpremitaj ol normale, estas, eĉ mondscale, maloftaĵo. Ĝi estis konstruita, kiam la Merovidoj transformis la romian bazilikon en katolikan preĝejon (do antaŭ la mezo de la 8-a jarcento) por trionigi la internaĵon de la preĝejo, donante propran parton al diservantoj, ĉantistoj kaj ĉeestantaro. La kancelo estas repertuaro de la prakristana simbolismo: vivarbo, ĉielpordo, serpento-plektaĵo, ktp..., sed la plej valora ero de la kancelo estas la panelo de la Konsekro, kie aperas Kristo mem prezentanta rondan hostion kaj pokalon. Ĉi-tie maloftega sceno sole sufiĉus por pravigi la mondfamon de la kancelo. Kiuj interesiĝas pri la originoj de la kristanismo, ne rajtus maltrafi la muzeon de Metz.

6) *Galla paganismo*. Despli ke oni tie vizitos ne nur la unuajn memoraĵojn de la triumfanta kristanismo, sed ankaŭ la lastajn restaĵojn de la foriranta Galla paganismo. Metz estis romia ĉefurbo, sed la landon daŭre posedadis la paganaj kultoj, kies steleo gardis la Galla-romian stilon dekadencan. La muzeo havas belan kolekton de tiuj enigmaj figuroj, kies pli bela ekzemplo eble estas la steleo dediĉita al Merkuro (MERCURIO ESVNERTUS SOUNI F(ilius) (filius) V.S.L.M.).

La kongresejo situas je ducent paŝoj de la muzeo. Espereble neniu kulturema homo forlasos Metz sen viziti ĝian unikan kolektaron.

Eugène de Zilah

Aliĝu tuj al la treege interesa 11-a Internacia Konferenco de N.E.M. en Metz

NOVAĴOJ PRI AKADEMIO INTERNACIA DE SCIENCO (AIS)

(Laŭ oficialaj dokumentoj)

AIS EKZISTAS

El noto pri telefona interparolado inter la Deputito d-rino Fausta Morganti kaj prof. d-ro Frank, 1984-11-21, 12:45 horo (elgermanigite):

D-rino Morganti konstatas, ke surbaze de la registara decido de la 19a de majo pasintjara AIS ekzistas. Krome la registaro eksciis, ke la sciencistoj antaŭviditaj por alvoko fakte eklaboris. Pro tio, ke ankoraŭ mankas laŭleĝe aprobita Statuto kaj enkadrigo de la laboro de la Akademio en la buĝeton, la laboro de AIS provizore estas konsiderenda kiel "privata" tiusence, ke ĝi ne rajtas konduki al devoj por San Marino; tamen la aldono de la ŝtata nomo "San Marino" al AIS jam okazu.

MALLONGIGO DE LA AIS-STATUTO

Estas unuanime aprobite ke prof. d-ro Neergaard kiel vicprezidanto transprenu la taskon prilabori la proponon de AIS-Statuto faritan de la Iniciatgrupo de EK kaj rezulte sugestu al la ministrino anstataŭe mallongigitan tekston. Tiu mallongigo - parte redakcia, parte jura - nepre ne tuŝu aŭ ŝanĝu la bazojn de la ĝisnune proponita AIS-Statuto kaj enhavu klaŭzojn, ke eroj de la ĝisnuna propono ne transprenitaj en la nunan sugeston daŭre validu kiel parto de la provizora regularo. Prof. d-ro Neergaard estu jure helpata de prof. d-ro Lapenna. La ĜA konstatas, ke la vicprezidanto krome verkos proponon por la pluevoluigo de AIS al duopo konsistanta el Akademio kaj Universitato; la mallonga "konkrete propono" estu, antaŭ ĉiu diskonigo eksteren, prezentita al la membraro de AIS por definitiva akcepto.

(Noto: La mallongigita teksto de la Statuto estas jam verkita)

DUAJ SANMARINAJ UNIVERSITATAJ SEMAJNOJ (SUS)

Laŭ telefona informo de d-rino Fausta MORGANTI de la 30-a de januaro 1985, la oficiala decido pri la Statuto de AIS ne povas okazi jam en februaro aŭ marto 1985/1685 pŝR, sed verŝajne nur en aprilo. Tial, interkonsente kun altkomitatanino Adj. Marina MICHELOTTI prof., la datoj de la 2-aj SUS estas fiksitaj jene: de vendredo, la 27a de decembro 1985/1685 pŝR ĝis sabato, la 4a de januaro. La membroj de la Internacia Scienca Kolegio bv. proponi kursojn kaj unuopajn prelegojn prefere antaŭ la 30a de junio al la koncernaj dekanoj.

Ĉiujn organizajn informojn provizore havigos Adj. Marina MICHELOTTI prof., p/a Hotelo La Grotta, Via M. Delfico 40, RSM-47031 San Marino, tel. 0039541-991134 aŭ -991214.

FONDAĴO IVO LAPENNA

Plena listo de la ĝisnunaj kontribuajfoj:

S-ro Sam Zinglersen, Danio	4000,00	dkr.
Akademiano el Danio	2000,00	"
S-ro P. Zacho, Danio	500,00	"
Inĝ. Ivo Godek, Jugoslavio	60,00	"
Anonima donaco el Britio	1000,00	"
F-ino M. Vermaas, Nederlando	1000,00	"
D-rino K. Rukavina-Danon, Germanio	1000,00	"
Anonima donaco el Germanio	1000,00	"
Anonima donaco el Germanio	500,00	"
Ges-roj Harry kaj Nora Holmes, Britio	300,00	"
Ges-roj Madeleine kaj Eugène de Zilah, Francio	1000,00	"
D-rino K. Rukavina-Danon, Germanio	320,00	"
Anonima donaco el Germanio	893,48	"
D-rino K. Rukavina-Danon, Germanio	732,30	"

Entute:

14305,78 dkr.

AMNESTIO INTERNACIA

En oktobro 1983 *Amnestio Internacia* adoptis la ĉi-suban *dekdu-punktan programon* kiel parton de sia tutmonda kampanjo kontraŭ torturado.

Unu el la ĉefaj celoj de ĉi tiu kampanjo estas la efektivigo de la dekdu-punkta programo. Tial *Amnestio Internacia* apelas al organizaĵoj, personoj kaj speciale al registaroj akceli ĉi tiun efektivigon. Oni povas plej trafĉe difini la programon kiel "dezirliston" de paŝoj kiujn devus fari registaroj en landoj kie torturado hodiaŭ okazas. Se ĉiuj registaroj observos ĉi tiujn dek du punktojn, torturado malaperos de la terglobo.

1) *Registara kondamno de torturado*

La plej altaj aŭtoritatuloj de ĉiu lando devas esprimi sian absolutan malakcepton de torturoj. Ili devas komprenigi al tiuj kiuj estas ŝargitaj per konservado de la leĝo, ke torturado estos neniel tolerata.

2) *Limigo de la daŭro de inkomunikado-reteno*

Torturado ofte okazas kiam la viktimoj estas retenataj en "inkomunikado", t.e. ke dum la tempo de la inkomunikado-reteno ili ne rajtas havi kontakton kun personoj ekster la prizono kiuj povus helpi ilin aŭ eltrovi kio okazas al ili.

Ĉiu registaro devas garantii ke inkomunikado-enŝlosa ne prezentas eblon por torturado. Tial estas ekstreme grava ke oni konduku ĉiun kaptiton antaŭ juĝan instancon tuj post lia/ŝia enŝlosiĝo kaj rapide kaj regule permesu al parencoj, advokatoj kaj kuracistoj viziti lin/ŝin.

3) *Ne sekreta retenado*

En iuj landoj torturado okazas en sekretaj centroj, ofte post "malapero" de la viktimoj. Registaroj devas zorgi ke kaptitoj estu retenataj en lokoj oficiale rekonitaj kaj ke parencoj kaj advokatoj disponu precizajn informojn pri la restadejo.

4) *Garantioj dum pridemandado kaj retenado*

Registaroj devas regule kontroli la plenumon de la proceduroj pri retenado kaj pridemandado. Oni devas tuj informi ĉiujn kaptitojn pri iliaj rajtoj, inter kiuj ankaŭ la rajto plendi pri la traktado. Sendependaj instancoj devas regule viziti reten-centrojn por inspektado. Se retenado kaj pridemandado apartenas al la respondeco de diferencaj instancoj, tio estus grava garantio kontraŭ torturado.

5) *Sendependa ekzamenado de informoj pri torturado*

Registaroj devas zorgi ke nepartieca kaj fidinda ekzamenado estu farata pri ĉiaj plendoj kaj informoj pri torturado. Oni devas publikigi la metodon de ekzamenado kaj ties rezultojn, kiel ankaŭ sekurigi plendantojn kaj atestantojn kontraŭ timigo.

6) *Nevalideco de konfeso eldevigitaj per torturado*

Registaroj devas zorgi ke konfeso aŭ alia pruv-materiale kiun oni eldevigis per torturado, neniam uziĝu en juĝaj proceduroj.

7) *Leĝa malpermeso de torturado*

Registaroj devas zorgi ke torturado estu leĝe malpermesita kaj punebligita. Konforme al la internacia juro la malpermeso de torturado neniam devas esti prokrastata, ankaŭ ne pro sieĝostato aŭ kiu ajn alia kriza situacio.

8) *Persekutado de torturistoj*

Personoj kiuj mem torturis aŭ sub kies respondeco oni torturis, devas esti juĝataj. Ĉi tiu principo devas validi nekonsidere la lokon kie troviĝas ĉi tiuj

SAGAJ VORTOJ PRI SAĜO KAJ MALSAĜO

"Kiu batalas kun stultuloj, tiu ne havos grandajn venkojn!" - Michelangelo Buonarroti (1475-1564).

Ni aldonas: Ĝuste. Sed saĝulo fine venkas eĉ inkviziciojn: "*Eppur si muove!*" (Tamen ĝi moviĝas). - Galileo Galilei (1564-1642).

"Al saĝulo unu okulo sufiĉas". - Proverbo en pluraj lingvoj.

Ni aldonas: Al malsaĝulo eĉ cent okuloj ne utilus.

"Pli multe unu malsaĝulo povas demandi, ol cent saĝuloj kapablas respondi". - Ĉina filozofo nekonata.

Ni aldonas: Pli multe unu saĝulo povas diri, ol ĉiuj malsaĝuloj kune povas aŭdi.

"La sorto decidis jene: Feliĉon al ĉiuj malsaĝuloj pro malsaĝo, malfeliĉon al saĝuloj pro la saĝo". - A.S. Gribojedov, rusa verkisto (1795-1829).

Ni aldonas: Nenion.

Peter Zacho

Horizonto, la laŭtparolilo de partipolitika neŭtraleco en la Esperanto-Movado, sendependa sentinelo de ties principoj, ĉiam aktuala kun daŭra historia valoro. Abonu kaj abonigu al ĝi viajn geamikojn.

personoj, nekonsidere kie la krimo okazis kaj nekonsidere la naciecon de kulpuloj kaj viktimoj. Ne devas ekzisti "rifugejo" por torturistoj.

9) La trejnado de funkciuloj

Dum la trejnado de ĉiuj funkciuloj engaĝitaj en gardado, pridemandado aŭ traktado de kaptitoj, oni devas emfaze komprenigi ke torturado estas krimo. Oni devas atentigi ilin ke ili estas devigitaj malakcepti kian ajn ordonon torturi.

10) Kompensado kaj rehonorigo (rehabilitacio)

Viktimoj kaj tiuj kiuj dependas de ili devas rajti pri kompenso. Viktimoj povu disponi la bezonatan medicinan zorgon kaj/aŭ la eblojn de rehonorigo.

11) Internacia resonado

Registaroj devas utiligi ĉiujn disponeblajn kanalojn por uzi sian influon ĉe tiuj registaroj kiujn oni kulpigas pri torturado. Oni devas krei kaj uzi interregistarajn mekanismojn por rapide ekzameni informojn pri torturoj kaj por efike agi kontraŭ ilin. Registaroj devas zorgi ke nek trejnado de militista polica aŭ sekureca personalo, nek transdono de kono stimulu la aplikon de torturado.

12) Ratifiko de internaciaj traktatoj

Ĉiuj registaroj devas ratifiki internaciajn traktatojn kiuj donas garantiojn kontraŭ torturado kaj samtempe la rimedojn por kontraŭbatali ĝin. Tio ĉi aplikiĝas speciale pri la Internacia Traktato pri Civitanaj Rajtoj kaj Politikaj Rajtoj inkluzive de la apartena Fakultativa Protokolo, kiu reguligas la individuan plendorajton.

Feiko Munniksma

POST LA MORTO

Antoni Isern


*Ĉie, kie ajn, naskiĝas la Vivoforto,
kaj ĉio, kio naskiĝis, venos al la Morto.
Adiaŭ! Kio mi estis, mi ne plu estos,
kio en mi jam ardis, ne plu en mi ardos.
Adiaŭ! Kion mi vidis ne plu mi rigardos
kaj ankaŭ kion mi kredis, mi ne plu kredos.
La nobla vivada spiro de mia penso
ekfalis en malplenon laŭ fatala drivo
kiel folio de l' arbo de la Vivo
kaj ne plu revenos al la sveninta menso.
Neniam plu miaj manoj premos aliajn
nek al belaĵoj sin turnos miaj okuloj,
mi fidas nur ke sopiros min fideluloj
kiuj priploros min en horoj nostalgiaj.
Funebra sonorado vibradu tra l' aero
je la vesperiĝo por mia enterigo.
Enŝovu min kun sankta am' en teran sinon
kaj surkovru min per la elfosita tero.
Super mi furiozos laŭ la tempopaso
militoj, inundoj, tempestoj kaj ciklonoj,
Sed per detruigo la mortoregionoj
fariĝos nova Vivo, vivoplenaj kampoj
kie la verda, freŝe kreskanta herbaro
enŝovos la radikojn en mian ostaron.*

El la kataluna tradukis Salvador Gumà

Antoni Isern (1883-1906). Li naskiĝis en vilaĝo Alcover, kataluna regiono de Hispanio. Li kreskis en kampa domo kaj ricevis nenian instruon. Tamen en sia 15-a jaro li publikigis poemareton videble pesimisman. En 1903 li aperigis alian pli vastan kaj en 1906, nur 23-jara li sufokis sin en cisterno. Li agadis en la progresema, plej liberala rondo de verkistoj.

LA NAJTINGALO

Theodor Storm (1817-1888)



*Pri tio kulpas najtingal',
ĝi tutan nokton ploris;
pro ĝia dolĉa amĥoral'
tra sona kaj resona skal'
la rozoj jen ekfloris.*

*Sovaĝa estis ŝi infan',
en revoj ŝi nun dronas,
somerĉapelon en la man',
suferas en sunarda ban',
ne helpo plu ŝi konas.*

*Pri tio kulpas najtingal',
ĝi tutan nokton ploris;
pro ĝia dolĉa amĥoral'
tra sona kaj resona skal'
la rozoj jen ekfloris.*

El la germana tradukis Guido Holz

NOSTALGIO

*Malnova ŝipo, ho memor',
Ĝis kie vi en pasintecon
Kruele min elportos for,
Ŝirante sange ĉiun pecon
De mia plu amanta kor'?*

*Memoru do: ŝi estis bela,
Kun en la vejnoj suna sang'.
Ho, ve! Neniam plu tiela
Ricevos sur varmega vang'
Kiseton en mateno hela.*

Bernard Aunis



BALADOJ

JOĈJO SABLO

*Edziĝis iu Joĉjo Sablo
al Lizabeta Hago;
kun oro ŝi, sed sen afablo,
iĝis tre peza plago.
Li diris, ke pro tiu meger',
skolda kapriculin',
la viv' lin tedis; estis ver'.
Kaj li jam tedis ŝin.
Kaj li jam tedis ŝin.*

*Li diris, "Mi dronigos min
en la rivero sube!"
"Jes, stulta edzo - taŭga fin'!
Jen mia rev', sendube!"
Li diris, "Staros mi sur bordo;
malsupren vi rapidu;
min puŝu per la tuta forto."
"Jes, kara, jes. Min fidu.
Jes, kara, jes. Min fidu."*

*"Eble kuraĝo lasos min,
mi penos min eligi;
tial bonvolu, karulin',
manojn post dorso ligi."
"Certe!" ŝi diris, ligis forte,
sekure per la ŝnuro;
"Nun, kara, staru vi ĉe borde,
pretiĝos mi por kuro.
Pretiĝos mi por kuro."*

*Laŭ la dekliv', per plena forto,
Linjo sin ĵetis kure;
li paŝis flanken sur la bordo;
enfalis ŝi, nature.
Tra laŭtaj plaŭdoj sonis kri' -
"Min savu, Joĉjo Sablo!"
"Tre volas, sed ne povas mi;
vi ligis min per kablo.
Vi ligis min per kablo."*

Tradukis Marjorie Boulton

La plej belaj baladoj kutime estas tiuj, kies temoj estas tragikaj; sed ekzistas multaj baladoj humuraj aŭ ironiaj, inter ili multaj pri la malĝojoj kaj konfliktoj de geedza vivo ne harmonia.

Joĉjo Sablo (angle Johnny Sands) estas unu el tiuj baladoj: amuza, iom kruda, sed kun strukturo preskaŭ eleganta.

La fino de nia serio pri Zamenhofaj citaĵoj
okaze de lia 125-jara datreveno, 1984

L. L. ZAMENHOF

ORIGINALA VERKARO

ANTAŬPAROLOJ—GAZETARTIKOLOJ—TRAKTAĴOJ
PAROLADOJ—LETEROJ—POEMOJ

KOLEKTITAJ KAJ ORDIGITAJ DE
D-RO JOH. DIETTERLE

N-ro 2.

Unua Kongreso 1905 en Boulogne-sur-Mer

Wörter: Part I

Fr. Schneeberger, „Detala Raporto pri la oficialaj paroladoj, diskutadoj kaj decidoj de la Unua Universala Kongreso de Esperanto en Bulonjo-sur-Marco“. Oficejo de Esperanto kaj Stenografio. Laufen (Svisujo) 1905, pag. 8—15.

„Lingvo Internacia“ X. 1905, pag. 362—367.

„Esperantista Dokumentaro“. Kajero anua (Aŭg. 1916), pag. 25—30.

„Deveno kaj Historio de Esperanto“, eld. Časopis Českých Esperantistů, Praha 1908 (= Biblioteko de Časopis Českých Esperantistů No. 2)⁴.

Estimataj sinjorinoj kaj sinjoroj! — Mi salutas vin, karaj samideanoj, fratoj kaj fratinoj el la granda tutmonda homa familio, kiuj kunvenis el landoj proksimaj kaj malproksimaj, el la plej diversaj regnoj de la mondo, por frate premi al si reciproke la manojn pro la nomo de granda ideo, kiu ĉiujn nin ligas.

.....

Kaj nun la unuan fojon la revo de miljaroj komencas realiĝi. En la malgrandan urbon de la franca marbordo kunvenis homoj el la plej diversaj landoj kaj nacioj, kaj ili renkontas sin reciproke ne mute kaj surde, sed ili komprenas unu alian, ili parolas unu kun la alia kiel fratoj, kiel membroj de unu nacio. Ofte kunvenas personoj de malsamaj nacioj kaj komprenas unu alian; sed kia grandega diferenco estas inter ilia reciproka komprenigado kaj la nia! Tie komprenas sin reciproke nur tre malgranda parto da kunvenintoj, kiuj havis la eblon dediĉi multegon da tempo kaj multegon da mono, por lerni fremdajn lingvojn, — ĉiuj aliaj partoprenas en la kunveno nur per sia korpo, ne per sia kapo: sed en nia kunveno reciproke sin komprenas ĉiuj partoprenantoj, nin facile komprenas ĉiu, kiu nur deziras nin kompreni, kaj nek malriĉeco, nek nehavado de tempo fermas al iu la orelojn por niaj paroloj. Tie la reciproka komprenigado estas atingebla per vojo nenatura, ofenda kaj maljusta, ĉar tie la membro de unu nacio humiliĝas antaŭ la membro de alia nacio, parolas lian lingvon, hontigante la sian, balbutas kaj ruĝiĝas kaj sentas sin ĝenata antaŭ sia kunparolanto, dum tiu ĉi lasta sentas sin forta kaj fiera; en nia kunveno ne ekzistas nacioj fortaj kaj malfortaj, privilegiitaj kaj senprivilegiitaj, neniu humiliĝas, neniu sin ĝenas; ni ĉiuj staras sur fundamento neŭtrala, ni ĉiuj estas plene egalrajtaj;



La iniciatoro de la Internacia
Lingvo (Esperanto) D-ro L.L.
Zamenhof

ni ĉiuj sentas nin kiel membroj de unu nacio, kiel membroj de unu familio, kaj la unuan fojon en la homa historio ni, membroj de la plej malsamaj popoloj, staras unu apud alia ne kiel fremduloj, ne kiel konkurantoj, sed kiel fratoj, kiuj, ne altrudante unu al alia sian lingvon, komprenas sin reciproke, ne suspektas unu alian pro mallumo ilin dividanta, amas sin reciproke kaj premas al si reciproke la manojn ne hipokrite, kiel alinaciano al alinaciano, sed sincere, kiel homo al homo. Ni konsciu bone la tutan gravecon de la hodiaŭa tago, ĉar hodiaŭ inter la gastamaj muroj de Bulonjo-sur-Marco kunvenis ne francoj kun angloj, ne rusoj kun poloj, sed homoj kun homoj. Benata estu la tago, kaj grandaj kaj gloraj estu ĝiaj sekvoj!

Ni kunvenis hodiaŭ, por montri al la mondo, per faktoj nerefuteblaj, tion, kion la mondo ĝis nun ne volis kredi. Ni montrons al la mondo, ke reciproka komprenigado inter personoj de malsamaj nacioj estas tute bone atingebla, ke por ĉi tio tute ne estas necese, ke unu popolo humiliĝu aŭ englutu alian, ke la muroj inter la popoloj tute ne estas io neceseĝa kaj eterna, ke reciproka komprenigado inter kreitaĵoj de tiu sama speco estas ne ia fantazia revo, sed apero tute natura, kiu pro tre bedaŭrindaj kaj hontindaj cirkonstancoj estis nur tre longe prokrastita, sed kiu pli aŭ malpli frue nepre devis veni kaj kiu fine nun venis, kiu nun elpaŝas ankoraŭ tre malkuraĝe, sed, unu fojon ekirinte, jam ne haltos kaj baldaŭ tiel potencege ekregos en la mondo, ke niaj nepoj eĉ ne volos kredi, ke estis iam alie, ke la homoj, la reĝoj de la mondo, longan tempon ne komprenis unu alian! Estas vero, ke multaj el ni posedas nian lingvon ankoraŭ tre malbone kaj malfacile balbutas, anstataŭ paroli flue; sed, komparante ilian balbutadon kun la perfekta flua parolado de aliaj personoj, ĉiu konscienca observanto facile rimarkos, ke la kaŭzo de la balbutado kuŝas ne en la lingvo, sed nur en la nesufiĉa ekzerciteco de la diritaj personoj.

Post multaj miljaroj da reciproka surda-muteco kaj batalado, nun en Bulonjo-sur-Marco fakte komenciĝas en pli granda mezuro la reciproka komprenigado kaj fratiĝado de la diverspopolaj membroj de la homaro; kaj unu fojon komenciĝinte, ĝi jam ne haltos, sed irados antaŭen ĉiam pli kaj pli potence, ĝis la lastaj ombroj de la eterna mallumo malaperos por ĉiam. Gravegaj estas la nunaj tagoj en Bulonjo-sur-Marco, kaj ili estu benataj!

KIO ESTAS "KOMUNA PASPORTO"?

Leginte la titolon, vi tre verŝajne respondas al vi mem: "Evidente, tio estas ia familia aŭ grupa pasporto por pluraj personoj", ĉar tiaj pasportoj ja ekzistas en diversaj landoj. Se tiel, vi eraris, ĉar ne temas pri tia komuna - familia aŭ grupa - pasporto, sed temas pri la nova eŭropa pasporto de la Eŭropa Ekonomia Komunaĵo, laŭ *Monato* n-ro 2/85, p. 7, kie mi trovis "komuna pasporto" en tiu erara senco. Tion mi des pli bedaŭras, ĉar *Monato* estas unuaranga periodaĵo, bonege redaktata, ĝenerale sur tre alta lingva nivelo, konsiderinde kontribuanta al la esperantlingva kulturo.

Mi ne ripetos ĉi tie la argumentojn, kiuj igis min antaŭ tro multaj jaroj, jam meze de la kvindekaj, enkonduki la terminon "Komunaĵo" por EEK kiel tuto, resp. por ĉiu el la tri Eŭropaj Komunaĵoj aparte. Mi ne faris tion facilanime, sed post bona pripenso. Mi hezitis inter neologismo "Komunitato" kaj la kunmetaĵo "Komunaĵo", ĉar necesis havi apartan esprimon, same kiel en multaj aliaj lingvoj, disde "Komunumo", kies baza senco ekde la tempoj de Zamenhof estas "malgranda administra distrikto" en ĉiuj ŝtatoj, kiuj havas tiajn administrajn unuojn. Post tio la esprimo "Komunaĵo" estis kaj plu estas vaste uzata ne nur de juristoj kaj de *Internacia Jura Revuo*, sed ankaŭ de aliaj. Ĝi troviĝas ankaŭ en PIV, p. 538. Nur en la lastaj jaroj - lige kun la ĝenerala kaj tre danĝera malrespektado de la lingvaj tradicioj kaj eĉ de la Fundamento, pri kio alian fojon - oni komencis uzi por EEK jenajn terminojn: Komunumo, Komununoj, Komunumaro, Komunumaroj, Komunumo, Komunonoj, eble ankaŭ aliajn. Tio estas *malbonega*: juro ne toleras du aŭ plurajn terminojn por la sama nocio, kaj nomo de interŝtata organizaĵo ja apartenas al kategorio de juraj nocioj. Ankaŭ senkonsidere al juro, pluraj terminoj por la sama nocio kaŭzas konfuzon kaj miskomprenojn, kiel montras la "komuna pasporto". Ne povas esti alimaniere: se oni substantivigas la adjektivan radikon "komun-a" kaj donas al la substantivo la sencon de "Komunaĵo" en la nomo de EEK, do la readjektivigo de "Komunono" rezultigas "komuna" en la origina adjektiva senco, certe ne "rilatanta al Komunono", t.e. al Komunaĵo.

La opinio de kelkaj, ke "homamaso ne estas aĵo" kaj ke tial "komunaĵo" ne estas taŭga, ne ŝajnas al mi ĝusta, ĉar en Esperanto jam delonge ekzistas la esprimo "organizaĵo" ne nur en la senco de organizita grupo de ŝtatoj aŭ juraj personoj, sed ankaŭ kiel organizita grupo de homoj ("homamasoj"). Krome, Eŭropa Ekonomia Komunaĵo estas organizaĵo de ŝtatoj, ne rekte de "homamasoj". Cetere, mi mem konsentus enkonduki por tiu senco la esprimon "Komunitato", se ĝi trovus ĝeneralan aprobon, sed mi plej firme opinias, ke ankaŭ en Esperanto, same kiel en tre multaj aliaj lingvoj, ni devas havi unu esprimon por la baza distrikta unuo (komunumo) kaj por similaj komunumoj (ekz. religiaj), kaj alian esprimon por EEK, plej oportune la jam enkondukitan "Komunaĵo".

Intertempe *Horizonto*, *Internacia Jura Revuo* kaj juristoj-esperantistoj en IEAJ plu uzos la esprimon "Komunaĵo" por EEK kaj "komunumo" por la baza administra distrikto. Ni tre esperas, ke *Monato* atente konsideros la suprajn argumentojn kaj helpas al konservo de la establitaj terminoj en la intereso de la lingva unueco. Per tio ĝi faros plian grandan servon al Esperanto, La aliaj Esperanto-periodaĵoj, precipe tiuj kun relative granda legantaro kiel *Esperanto* kaj *Sennaciulo*, devus fari la samon, kun la sama celo.

I.L.

Se vi konscias, ke la internacia neŭtrala Esperanto-Movado devas esprimiĝi, helpu al *Horizonto* per diskonigo de ĝia enhavo, abonado kaj instigo al legado.

JUBILEAJ PRESAĴOJ 1987

AFIŜOJ - POŝTKARTOJ - GLUMARKOJ

Baza simbolo: Fotoreproduktaĵo de la skulptaĵo "La Espero" de la konata dana skulptisto Jesper Neergaard, filo de Paul Neergaard, vicprezidanto de la Akademio de Esperanto.

Teksto de Ivo Lapenna esprimanta la rolon de Esperanto kiel monda komunikilo kaj ĝian idean signifon

Koloroj: Diversaj nuancoj de la blua kaj blanka sur luksa papero.

Prezoj (inkluzive la sendkoston):

4 afiŝoj: 60 danaj kronoj aŭ egalvaloro

10 poŝtkartoj: 25 danaj kronoj aŭ egalvaloro

1 folio de luksaj glumarkoj:
6 danaj kronoj aŭ egalvaloro

Ĉe mendo de 5 serioj de kiu ajn el la publikaĵoj 1 plia serio senpage.

ĜUSTA MEZAĜO

EN ĜUSTA FORMO

AL ĜUSTAJ MEDIOJ



La poŝtkarto, 11 cm x 15 cm

La afiŝo, 48 cm x 68 cm

"La Espero"

Viajn mendojn bv. direkti al la kasistino de ICNEM, S-ino Rie Zacho, Nørregårdsvej 91, DK-2610 Rødovre, Danio, poŝtĉeka konto: ICNEM 1987: Kopenhago 6 21 82 10. Bv. nepre indiki sur la ĝirilo la kvanton de afiŝoj, poŝtkartoj kaj glumarkoj, kiujn vi mendas kaj por kiuj vi pagas.

PER VIAJ MENDOJ VI KONTRIBUAS AL LA JUBILEA JARO KAJ HELPAS AL DISVASTIGO DE ESPERANTO

Leteroj

Estimata sinjoro,

Bonegaj estas la artikoloj rebantantaj la kontraŭfundamentemulojn. En fabelo nun preparata, mi ne sciis kiel mi paroligu la diablon. Dank' al D-ro István Nagy, mi scias, ke li diros:

Aŭtem! ak! nam! ma! dos! tum!
 Forsin! Olim! enim! kum!
 Sed mi vane krokodilas:
 Ĉi neniel plu utilas.
 Ku! Ko! Ka! Kom! Kal! Kes! Kaŭ!
 I! ki! ti! fro! pon! sob! daŭ!
 Sed, se volis ion Dio,
 Povas helpi ja nenio.

Respekteme


 Bernard Aunis



D-rino Käthe Rukavina-Danon, forta apoganto de ICNEM, en konversacio kun D-ro R. Sachs dum la Jubilea Festo en Kopenhago la 15-an de decembro 1984

Donacoj al Horizonte

S-ro Anton Schrempf, Aŭstrio (por nepagipova lando)	130,00	dkr.
S-ro Maurice Crochet, Francio (por nepagipova lando)	100,00	"
S-ino Rosemarie Wiegand, Germanio	142,40	"
S-ro Günther Feis, Germanio	17,80	"
S-ino Maria Korgner, Aŭstrio	53,00	"
S-ino Leopoldine Heilingner, Aŭstrio	55,00	"
S-ro Felix Primetzhofer, Aŭstrio	55,00	"

NOVA NUMERO DE "SIMPOZIO"

Jam la trian jaron regule aperadas *Simpozio*, oficiala organo de Filozofia Asocio Tutmonda (FAT). La pasintan marton aperis la kvina laŭvica n-ro. La 44-paĝa kajero, inkluzive la kovrilojn, pritraktas en nombro da artikoloj kaj unu recenzo plurajn pripensindajn filozofiajn temojn. Aparte menciindaj estas la artikoloj de Evaldo Pauli: "Filozofia Movado de FAT" kaj "Scienca Spirito", tiu de Claude Piron pri "Scienco kaj Pseŭdoscienco en la Socio Nuntempa" kaj tiu de Albert Goodheir titolita "Spinoza pri Rektigo de Kompreno". Interesa, sed kelkrilate tre diskutinda estas la dupaĝa artikolo "La Internacia Lingvo kaj la Homa Penso" de Rikardo Ŝulco. El lingva vidpunkto ne ĉiuj kontribuaĵoj troviĝas sur la sama nivelo: kelkaj estas tre bonaj, aliaj estus postulintaj iom da reviziado antaŭ la presigo.

La prezidanto de FAT, samtempe ĉefredaktoro de *Simpozio*, estas Evaldo Pauli (Brazilo) kaj la vicprezidanto estas Eugène de Zilah (Francio). Ambaŭ prelegos kadre de la 11-a Internacia Konferenco de la Neŭtrala Esperanto-Movado en Metz. Tie kaj la postan semajnon en Augsburg okazos ankaŭ kunvenoj de FAT.

Simpozio estas abonebla ĉe Gersi Alfredo Bays (Fonto), Caixa Postal 49, BR-89800 Chapec-SC, Brazilo, aŭ ĉe perantoj en diversaj landoj. La abonprezo estas preskaŭ nekredeble malalta: nur 2,50 usonaj dolaroj aŭ egalvaloro por 2 n-roj jare.

INTERNACIA ASOCIO DE HANDIKAPITAJ ESPERANTISTOJ (IAHE)

Ĝi estis fondita en 1983 laŭ iniciato de Dušan Adnadj, antaŭe redaktoro de la jugoslavia *Voĉo*, bedaŭrinde malaperinta. La celo de la Asocio estas kunligi ĉiujn handikapitojn, kiuj parolas la Internacian Lingvon, por ke ili, unuiĝintaj kaj kune kun aliaj, povu "aktive partopreni en la solvado de siaj problemoj kaj la problemoj de monda komunikado".

La prezidanto de IAHE estas Prof. Inĝ. Robert George Robertson el Aŭstralio, kaj la sekretario, samtempe redaktoro de *Voĉo de Handikapuloj*, estas la tre agema kaj sindona Dušan Adnadj el Jugoslavio.

En 1984 aperis ses n-roj de *Voĉo de Handikapuloj*. Ĝi havas tre grandan formaton de 18,5 x 12,5 centimetroj. Kvankam la enhavo estas kontentiga, tamen ĝi povos esti pli interesa kaj utila, se la redakcio sukcesos havigi en la estonteco pli da artikoloj kaj informoj rilatantaj al problemoj de handikapuloj kaj al solvado de tiuj problemoj en diversaj landoj kaj internacie, kaj malpli da ĝeneralizaĵoj.

En n-ro 6/84 la redaktoro alvokas la handikapulojn aliĝi al IAHE kaj ĉiujn aliajn helpi per donacoj kaj abonoj. *Horizonto* varme subtenas tiun alvokon. La membrokotizo estas 5 usonaj dolaroj aŭ egalvaloro jare, kaj 5 sovetiaj rubloj por sovetianoj kaj loĝantoj en orienteŭropaj landoj. La kotizo inkluzivas la abonon al *Voĉo de Handikapuloj*. Ĉiujn informojn donas, aliĝojn kaj donacojn akceptas la sekretario S-ro Dušan Adnadj, Školska ul. 25, YU-5627 Borovo, Jugoslavio.

Hamburgo en Retrospektivo, la plej cenzurita verko en la historio de la Esperanto-Movado, tabua por la timantoj de la vero, rivela por sinceraj esperantistoj, kaŝe cirkulanta kaj avide legata sub totalecaj reĝimoj. (V. la anoncon sur la lasta kovrilpaĝo).



"Agadi per lernolibroj, anoncoj, k.t.p. estas tre bone kaj necese; sed tio ĉi devas havi lokon *apud* la literaturo kaj ne *anstataŭ* la literaturo."

L. L. Zamenhof

LIBROJ SUB LA LUPEO

Redaktas Salvador Gumà, Paseo Prim, 38-7-6, Reus, Tarragona, Hispanio

ETULAJ AVENTUROJ

Zora Heide. Författeres Bokmaskin. Stokholmo 1983. 103 paĝoj.

Kiam mi eklegas verkon de Zora Heide, mi atendas kompetentecon, ekvilibron, freŝecon kaj ĉarmon; kaj ĉi tiu senpretenda libreto neniel seniluziigas min. Ĝi enhavas ok vive realismajn skizojn pri la vivo de infanoj, en kampara kulturo nun iom eksmoda, en lando nenie identigita, kredeble Jugoslavio. La infana pensmaniero estas, verŝajne, pli-malpli universala.

Elektio de mi por recenzi tian libron riskas aparte rigoran teston, ĉar ia deziro rerigardi sian infanecon (escepte eble por pli bone kompreni siajn problemojn, psikoterapie) estas por mi nekomprenebla; por mi tiuj "senzorgaj tagoj de infaneco" estas ĝuste la sezono de konstantaj zorgoj, timoj kaj konfuzoj, sen la ebleco de tiuj kompensoj, kiuj poste plibeligas niajn vivojn. Nostalgio pri tiu temo tuj vekus en mi suspektojn pri sentimentaleco - eĉ se ĝi fakte estus tute sincera. (Ni ĉiuj ofte akuzas pri sentimentaleco emociojn, kiuj hazarde ne estas inter niaj propraj.) Sed Zora Heide vere sukcesas fari ion ne facilan: bildigi infanajn travivaĵojn ĉarme, amuze; montri kiel ege gravas siatempe la aventurojn, tiel bagatelaj laŭ kriterioj de adoltoj; kaj samtempe implici multajn ironiojn, humore sugesti la limojn de infanaj komprenoj. Ekzemple, la tradiciaj ritoj ĉirkaŭ svatado kaj geedziĝo estas ege interesaj por la infanoj, dum ili komprenas nek la plej grandan sekreton, nek la multajn diversajn emociojn, kiuj gravas por la gefianĉoj kaj adoltaj familianoj; aŭ infano observas alian infanon kun tre rimarkemaj okuloj sed limigita kompreno. La ĝermoj de malbono en infana koro aperas sub la mikroskopo de Heide en *La Pomo* (ŝajne sencela obstino de knabino, kiu rifuzas provi lernejan taskon), kaj en *La Granda Boleto* (la detruema malico de envio). Kaj ofte kortuŝas ĝuste tiu limigita kompreno de la infanoj, kune kun la freŝa intenseco de la vivspertoj.

La verko ne estas pure aŭtobiografia: iasence ĝi estas aro de noveloj, ĉiu rakontita rekte de ia *mi*, kiu tamen estas foje knabo, foje knabino; temas pri ciganoj, knabo forportita en varvagono, lernejo, konceptoj pri feliĉo, nova fratineto, hundina amo al siaj hundidoj, fungoserĉado, vilaĝa geedziĝo - la intensa intereso, kiun prezentas la ordinara vivo, tiam brile nova, al etaj homidoj.

Kiel kutime ĉe Zora Heide, la lingvo estas klara, natureca, ege legebla, preskaŭ sen malgataĵoj. Ofte ŝi regalias nin per elegantaj - neniam afektaj - parolturnoj, kiuj malnaive sugestas la naivon de infanaj jaroj: "por ellerni praktike la botanikajn regulojn kaj la *malsimpatiajn nomenklaturejojn*". - (pri arbogrimpado) "mi konkuris kun sciuroj kies *profesia arto* estis, cetere, *neriproĉebla*." Fratineto ne leg-kapabla "kutimis sidi ĉirkaŭita de libroj, kiujn ŝi *senĉese foliumadis legante siajn proprajn elpensaĵojn*."

(Daŭrigo sur paĝo 75)

ESPERANTO NA JŽ (Esperanto en la Jugoslaviaj Fervojoj),

Mr. Gvozden Sredić, 3-a reviziita kaj kompletigita eldono, Beograd, 1985, broŝurita, 32 p.

Kvankam verkita en nacia lingvo, tamen ni ne povas ne mencii per kelkaj vortoj tiun valoran verketon. Ĝin eldonis Jugoslavia Asocio de Fervojistoj Esperantistoj (JAFE) okaze de la 30-jara datreveno de sia fondiĝo en aprilo 1955 kaj 60-jara datreveno de organizita laboro por Esperanto inter la jugoslaviaj fervojistoj. En la unua parto la aŭtoro klare prezentas la problemon de internacia kompreniĝo. Bedaŭrinde tie troviĝas kelkaj eraretoj, ŝuldataj verŝajne al la fakto, ke CED ekde 1975 praktike ne plu ekzistas, ke la iama informa aparato de UEA komplete kolapsis (en 1984 la sumo en la propaganda konto de UEA estis 0,00 gld.), kaj ke tial neniuj prizorgas la kompletigadon de la verko *Esperanto en Perspektivo*, se oni esceptas niajn modestajn kompletigojn en la rubriko ED. En la dua parto la aŭtoro kompetente pritraktas la historion kaj la nunan staton de Esperanto en la fervojistaj medioj. La lastaj du paĝoj - en Esperanto - estas dediĉitaj al la agadoj de JAFE: informado, kursoj, publikaĵoj, internaciaj ligoj, ktp. Tre imitinda laboro.

La broŝuro estas havebla ĉe Jugoslavia Asocio de Fervojistoj Esperantistoj, P.F. 563, Nemanjina 6, Beograd, Jugoslavio.

I. L.

POETO NE MORTAS

Ni ricevis antologieton, 32-paĝan, el la verkaro de la fame konata ĉeĥo *František Kožík*, naskita en 1909. Esperantistoj konas lin ĉefe kiel poeton, sed li verkis ankaŭ dramajn teatraĵojn por filmo kaj radio, biografiajn romanojn, eseojn kaj librojn por infanoj.

Ni ne povas ne citi frazon el lia mano: "En harmonio kun opinioj de la plej eminentaj spiritoj el sfero de la kultura vivo, alte elstaras la arto pri kreado de la ama kunestado, solidareco kaj respektoplena kaj reciproka atento de la homoj al homoj".

Tiuj sublimaj vortoj, tia pensado, devus esti gvidaj por la esperantistaro tutmonda. Tiel ne ĉiam estas. Kelkaj gazetoj infektadas siajn abonantojn per danĝera veneno: la malo de la *ama kunestado*, pri kiu parolas František Kožík.

Ni citu du versojn el poemo de František Kožík, tradukitajn de la same konata ĉeĥo Jiří Kořínek kaj direktitajn kaj la honestuloj kaj al la redaktoroj de tiaj gazetoj:

Vestu min bunte por min moki

Kaj ridi pri ĉi ludo

En kiu diri veron ni kuraĝas

Nur ne lasadu min mensogi

Kaj droni en la muto

Dum oni ĉirkaŭ mi Meleĥon priomaĝas

Naŭzegas min mensogi

Kun la kapjesoj folaj

Kaj kiel figuraĵo glate maski min

Vestu min bunte por min moki

Provoki mi ne volas

Nur viakulpaĵn ombrojn peli el anim'.

La tre leginda antologieto estas havebla ĉe: Ĉeĥa Esperanto-Asocio, Jilská 10, 110 01 Praha 1, Ĉeĥoslovakio.

P. Z.

Horizonto jam ludas sian tre pozitivan rolon en la Esperanto-Movado. Por ke ĝia voĉo eĥu eĉ pli vaste, diskonigu ĝin, disvastigu niajn komunajn ideojn, havigu almenaŭ unu plian abonanton, helpu nin helpi al Esperanto.

EVA ne estas virina nomo, sed mallongigo de Esperantlingva Verkista Asocio, fondita antaŭ nelonge de Tibor Sekelj. Pri la nova asocio Bernard Golden skribis: "Ŝajnas, ke oni deziras vaste malfermi la pordojn al preskaŭ ĉiu, kiu havas plumon en la mano. Mia argumento estas, ke necesas starigi objektivajn kriteriojn por membreco; nuraj personaj rekomendoj ne sufiĉas". La ŝama argumento povus esti direktita ankaŭ al pluraj aliaj t.n. fakaj Esperanto-organizaĵoj kaj institucioj.

La nombro de individuaj membroj de UEA malkreskis en 1984 al nuraj 6256 laŭ statistiko publikigita en *Esperanto* n-ro 2/85, p.39. Tio estas perdo de precize 1046 membroj kompare kun 1973, kiam UEA havis 7302 individuajn membrojn. Jen kien kondukis kaj plu kondukas la eventoj de 1974 en Hamburgo! Kompanse, la nombro de Honoraj Membroj (HM) kreskas de jaro al jaro kaj certe plu kreskos: en 1973 estis 17 HM, en 1974, pro eksigoj post la eventoj de Hamburgo kaj forpaso, restis 12 HM, sed en la lasta jardeko la gvidantaro de UEA ĉiujare eldonis kelkajn pliajn, tiel ke en 1984 la nombro estis 31, el kiuj kelkaj sendube havas meritojn por Esperanto. Ne estas konate kiom da personoj kun grandaj meritoj por Esperanto rifuzis por ne doni per siaj nomoj aproban sigelon al la nuna malkonstrua politiko de la gvidantaro de UEA.

Nikola Aleksiev, honora membro de UEA kaj de MEM publikigis en *Bulgara Esperantisto* de januaro 1985, organo de BEA, aliĝinta asocio de UEA, plian atakon kontraŭ la politikon de Usono kaj NATO-landoj distinge de la "porpaca politiko de Soveta Unio", laŭ la jam konata formulo.

Filozofia Asocio Tutmonda (FAT) havos siajn kunvenojn kaj en Metz dum la 11-a Internacia Konferenco de N.E.M., kaj la postan semajnon en Augsburg dum la UK de UEA.

La propaganda konto de UEA montras la jaran sumon de 0,00 guldenoj, laŭ *Esperanto* n-ro 2/85, p.39. Sen komento.

"Aliflanke, la provizora finkalkulo de la spezoj por 1984 donas multajn zorgojn, ĉar oni antaŭvidas signifan negativan saldon", laŭ *Esperanto* n-ro 2/85, p.22. Tio estas jam la tria sinsekva jaro de grandaj deficitoj, kiuj kreskas de jaro al jaro paralele kun la ĉesigado de agadoj. En 1983 UEA havis negativan saldon de preskaŭ 100.000 guldenoj. Ankoraŭ ne estas konate, kioma estas la "signifa negativa saldo" en 1984. Por sanigi la financon krizon la estraro de UEA nun proponas al la komitato ĉesigi la publikigadon de la tradicia kaj gravega *Jarlibro*, kaj anstataŭigi ĝin per ia surogato. Absolute admirindaj rezultoj de la "novaj metodoj" aplikataj ekde 1974!

Kulturan Esperanto-Festivalon organizas KEF, Esperanto-Centro, Brunnsgatan 21, S-111 38 Stockholm, Svedio. La Festivalo okazos en la malnova studenta urbo Uppsala de la 16-a ĝis la 19-a de majo 1985. KEF invitas al prezentado de teatraĵoj, poeziaĵoj, kanzonoj, muzikaĵoj k.s.

La Jarraporto de La Londona Esperanto-Klubo montras viglan kaj utilan laboron en 1984: 49 klubaj kunvenoj kun ĉeesto de 42,9 personoj meznombre; vasta informado en gazetoj kaj radio lige kun la kurso "La Strukturo de Esperanto", gvidota de D-ro John Wells kadre de la studoj pri lingvistiko en la Londona Universitato ekde la akademika jaro 1985-86; buntaj kaj interesaj vesperprogramoj (prelegoj, ĥoro, forumo, supera kurso ktp.); regula publikigado de la presita *Bulteno* kun programoj kaj aliaj informoj; libroservo. Dum la klubaj kunvenoj kaj aliaj aranĝoj nur Esperanto estas parolata. La Honora Prezidanto estas S-ro Harry Holmes, O.B.E., Aktiva Membro de ICNEM, kaj la prezidanto estas D-ro John Wells, eksterordinara profesoro (*reader*) en la Londona Universitato. La kunvenoj okazas ĉiuvendrede ekde la 18.30 h. en *Fred Tallant Hall*, 153 Drummond Str., Londono NW1 2PB. Gastoj-esperantistoj estas ĉiam bonvenaj.

Televid-raportistino de BBC-2, la plej prestiĝa brita televida kanalo, vizitis inkognite kunvenon de La Londona Esperanto-Klubo la 8-an de februaro 1985. La hazardo volis, ke ĝuste tiun vesperon Prof. D-ro I. Lapenna prelegis pri ICNEM. La kluba *Bulteno* de marto/aprilo skribis pri tio: "La 8-an de februaro venis televida raportistino de BBC-2, kiu vizitis la klubon prepare al mencio de Esperanto en la programo "Bookmark". Kun intereso kaj miro ŝi aŭskultis Prof. Lapenna prelegi al ni". Ne malbone por Esperanto ŝi trafis!

Ekzercojn pri interpersonaj rilatoj gvidos la pola psikosociologo kaj ĉefredaktoro de *Pola Esperantisto*, D-ro Tyburcjusz Tyblewski, dum du semajnfinoj en montara domo, super la lago Lemono, en la vilaĝo Ondallez, Svislando. La semajnfinoj estas tiuj de la 17-a ĝis la 19-a, kaj de la 24-a ĝis la 26-a de majo 1985. La renkontiĝojn organizas Esperanto-Societo de Lausanne. Pliajn informojn donas kaj aliĝojn akceptas Jacqueline Vasserot, Ch. du Coteau 21, CH-1009 Pully, Svislando.

Monda Federacio de Kulturaj Asocioj (MFKA), kies provizora sekretario estas D-ro E. de Zilah, ekfunkciis. La unua renkontiĝo de la reprezentantoj de kulturaj Esperanto-Asocioj okazos en Metz (Francio) dum la 11-a Internacia Konferenco de N.E.M.

En la "Kalendaro" de Esperanto-renkontiĝoj, publikigita sur kvar paĝoj de *Esperanto* n-ro 3/85, estas listigitaj gravaj kaj ankaŭ tute sensignifaj kunvenoj, kelkaj apenaŭ havantaj kion ajn komunan kun Esperanto. Fidela al sia multjara politiko de prisilentoj, la organo de UEA "forĝesis" menciis la Internacian Konferencon de N.E.M. en Metz, la jaran ĉefkunvenon de Internacia Esperanto-Asocio de Juristoj (IEAJ) kaj aliajn sendependajn renkontiĝojn kadre de la Konferenco. Plia ekzemplo de "objektiva" informado, per kiu UEA montras la veran karakteron de sia "neŭtraleco".

Internacia Somera Universitato (ISU), nun Internacia Kongresa Universitato (IKU), estis fondita en 1950 laŭ la iniciato de Prof. D-ro Ivo Lapenna, kiu ellaboris ĝian Regularon, organizis la unuan regulan sesion en Parizo (1950), dum pluraj jaroj funkciis kiel ĝia sekretario, kaj estis regula lekcianto ĝis 1974/75. En Augsburg, dum la UK de UEA, estos la 35-jara datreveno de la fondiĝo de ISU.

Esperanto - Einführung in die Internationale Sprache / Enkonduko en la Internacian Lingvon estas la titolo de libro aperinta en Graz (Aŭstrio) fine de 1984, eldonita de Societo de Aŭstria Esperanto-Instruistoj kune kun Internacia Kultura Servo Zagreb (Jugoslavio). Ĝi estas germanlingva prilaboro de la origina kroatserba libro, kiu aperis jam en pluraj aliaj lingvoj. La adaptan prizorgis laborgrupo en Graz. La libro estas mendebla ĉe: Societo de Aŭstria Esperanto-Instruistoj, Panoramagasse 3, A-8010 Graz, Aŭstrio.

Redaktas Kopenhaga Horizonto-Grupo
je la adreso de la administracio.

Libroj sub la Lupeo (Daŭrigo)

La ĝenerale bona presado enlasis kelkajn eraretojn (el kiuj, *butongruo* iom perpleksigus ornitologon); aŭtoraj eraroj preskaŭ mankas, sed (p.46) *brustojn* devus esti *bruston* aŭ *mamojn*; ĉu (pp.58, 64) *ekstermis* estas la plej taŭga vorto por mortigado de hundidaro? *buskoj* (p.70) ne troviĝas en PIV kaj *boskoj* ne taŭgus - ĉu *arbustoj*? Kiam recenzisto devas alpingli tiajn muŝetojn, por trovi ion riproĉindan, la libro estas vere bonstila. Mi rekomendas ĝin ne nur kiel literature valoran, sed kiel legaĵon modelan por postkomencantoj.

Marjorie Boulton



Prof. Evaldo Pauli

EVALDO PAULI

Evaldo Pauli naskiĝis en Ŝtato Sankta Katarina, Suda Brazilo, kie li senĉese laboris ekde 1955 kiel profesoro pri filozofio en la Universitato de Sankta Katarina ĝis la emeritiĝo en 1985. Ĝis 1980 li publikigis 12 verkojn en la portugala lingvo, precipe pri filozofio; ekde tiam li verkas nur en Esperanto kaj deziras publikigi serion de filozofiaj libroj en la Internacia Lingvo. En marto 1985 li estis elektita Prezidanto de la Esperanto-Asocio de Ŝtato Sankta Katarina. Li ankaŭ estas membro de la Beletra Akademio de Ŝtato Sankta Katarina.

Krom tio en Esperanto-medioj Evaldo Pauli estas konata kiel aktivulo de Filozofia Asocio Tutmonda (FAT) kaj ties prezidanto, fondinto kaj ĉefredaktoro de la Filozofia Revuo SIMPOZIO, aŭtoro de originalaj filozofiaj verkoj en la Internacia Lingvo, kiel ekz. "Rekta Pensado" (1983), "Pri Dubo kaj Certeco" (1984), "Mil jaroj de kristana filozofio" (1985) kaj esperantiĝinto de la helena verko de Porfirio "Enkonduko en la kategoriojn de Aristotelo kun komentarioj". Liaj aliaj prilozofiaj libroj jam estas pretaj por publikigado. Apogante sin sur tiuj verkoj, Evaldo Pauli planas eldoni ENCIKLOPEDION PRI FILOZOFIO EN LA INTERNACIA LINGVO ESPERANTO. Zorgante pri la internacia filozofia movado en Esperanto li partoprenas multajn naciajn kaj internaciajn kongresojn. Dum la 11-a I.K. de ICNEM prof. Evaldo Pauli prelegos pri: INTERNACIA HUMANISMO KAJ EDUKADO.

Eugène de Zilah

INTERNACIA ESPERANTO-ASOCIO DE JURISTOJ (IEAJ) havos sian jaran ĉefkunvenon, kun ampleksa tagordo laŭ la Statuto, dum la 11-a Internacia Konferenco de la sendependa kaj neŭtrala Esperanto-Movado en Metz, Francio, 27. julio - 02. aŭgusto 1985.

OFICIALAJ INFORMOJ de la AKADEMIO DE ESPERANTO

La Akademio elektis S-ron Baldur RAGNARSSON Direktoro de la Literatura Sekcio. Plie, pro la demisio de Prof. Geraldo MATTOS, S-ro Bernard GOLDEN estis elektita Direktoro de la Sekcio pri la Ĝenerala Vortaro.

Studado de la problemoj pri landnomoj daŭras; espereble baldaŭ povos esti eldonitaj unuaj rekomendoj. Aliflanke la Sekcio pri Gramatiko establis raporton pri sia studo de la prepozicio post la ago-substantivoj; la pleno de la Akademio nun studos tiun raporton kaj post voĉdono eldonos sian decidon.

*D-ro A. Albault
Prez.*

LA REDAKCIO RESPONDECAS PRI LA ĜENERALA LINIO DE HORIZONTO. SUBSKRIBITAJ ARTIKOLOJ NE NECESE REFLEKTAS LA STARPUNKTON DE LA REDAKCIO AŬ DE I.C.N.E.M.



INTERNACIA CENTRO de la NEŬTRALA ESPERANTO-MOVADO

Korespondada adreso: Kiu ajn el la funkciuloj de la Centro (v. sube).

FONDO KAJ CELOJ

Dum la *6-a Internacia Konferenco de la Neŭtrala Esperanto-Movado*, okazinta en Strasburgo en 1980, estis fondita *la Internacia Centro de la Neŭtrala Esperanto-Movado (ICNEM)*.

Unu el la celoj de *la Centro* estas manifesti kaj interne de la Esperanto-Movado kaj ekster ĝi la tradiciajn kulturajn kaj ĝenerale ideajn valorojn de la partipolitike kaj religie neŭtrala Esperanto-Movado.

La Centro kunordigas la laboron de ĉiuj neŭtralaj Esperanto-organizadoj, kiuj deziras tion. Ĝi kreas financon bazon por certigi aperadon de *Horizonto* kaj de aliaj publikaĵoj, kies linio konformas al la celoj de *la Centro* kaj al la *Deklaro de Principoj de la Neŭtrala Esperanto-Movado*.

La Centro tute ne celas fariĝi amasa Esperanto-organizaĵo aŭ konkurenci al kiu ajn Esperanto-societo. Tial ĝi havos nur limigitan nombron da ordinaraĵoj membroj.

MEMBRECO

Kiel ordinara membro povas esti akceptita ĉiu persono, kiu parolas la Internacian Lingvon kaj ĉiu Esperanto-organizaĵo, kiu agas konforme al art. 2 de *la Statuto*. Krome fizikaj kaj juraj personoj povas esti akceptitaj kiel neordinaraĵoj membroj. Informoj pri membrokategorioj kaj iliaj kontribuoj kaj kotizoj troviĝas en la sube menciitaj broŝuroj kaj aliĝilo.

PLENUMA KOMITATO

Prezidanto Prof. D-ro IVO LAPENNA, 77 Grasmere Avenue, Wembley,
HA 9 8TF, Middlesex, Britio.

Vicprezidantoj D-ro KLAUS PERKO, Lendkai 111, A-8020 Graz, Aŭstrio.
S-ro JEAN THIERRY, 5 rue Léon Cogniet, F-75017 Paris, Francio.

Sekretario F-ino MARIANNE VERMAAS, Nieuwe Binnenweg 70, I.R. 3015 BC
Rotterdam, Nederlando.

Kasisto S-ino RIE ZACHO, Nørregårdsvej 91, DK-2610 Rødovre, Danio.

LA CENTRO KAJ HORIZONTO

Ĉiuj membroj de *la Centro* ricevadas senpage la revuon *Horizonto*, sed tiu periodaĵo, eldonata de la *Eldonejo Perspektivo*, estas ankaŭ *aparte abonebla* rekte ĉe la eldonejo aŭ pere de la perantoj, kies nomoj kaj adresoj aperas sur la dua kovrilpaĝo.


ALIĜILOJ KAJ PAGOJ

Apartan broŝuron kun la Statuto de la Centro, Deklaro de Principoj, Rezolucio de la Konferenco de Ateno, ĉiujn aliajn informojn kaj aliĝilon bonvolu havigi ĉe la sekretario. Ĝi aŭ la kasisto akceptas la aliĝojn kaj kotizojn (poŝtĉeka konto de la Internacia Centro de la Neŭtrala Esperanto-Movado: Kopenhago 1 19 06 01). Bonvolu atenti: Se por iu deziranta aliĝi estas pli facile pagi al la prezidanto aŭ al unu el la vicprezidantoj, li/ŝi povas pagi la kotizon ankaŭ tiamaniere, kaj la koncerna funkciulo de la Centro ordigos tion kun la kasisto.

VERKOJ DE IVO LAPENNA

Verkitaj en la Internacia Lingvo.

*Ĉiuj inspiritaj de humaneca
internaciismo.*



El la verkaro de Ivo Lapenna en la kroata, la franca, la angla kaj la Internacia Lingvo kaj japana traduko de Retoriko.

Ĉiuj verkitaj en modela Esperanto.

RETORIKO, la plej legata libro de la postmilita periodo, jam pli ol 5.500 ekzempleroj disvenditaj, 3-a eldono, 294 p., bindita, prezo 10 anglaj pundoj, 140 danaj kronoj aŭ egalvaloro, 2-a eldono, bindita, nur 7 anglaj pundoj aŭ 98 dkr. (nur kelkaj ekzempleroj).

ELEKTITAJ PAROLADOJ KAJ PRELEGOJ, komplemento de "Retoriko", 152 p., fortike broŝurita, prezo 7 anglaj pundoj, 98 danaj kronoj aŭ egalvaloro.

AKTUALAJ PROBLEMOJ DE LA NUNTEMPA INTERNACIA VIVO, popularscienca kaj interesa por ĉiu klera persono, broŝurita, prezo 5 anglaj pundoj, 70 dkr. aŭ egalvaloro.

ESPERANTO EN PERSPEKTIVO (ĉefaŭtoro kaj ĉefredaktoro), monumenta, reklamata de UEA kiel "enciklopedio de la nuna tempo", tamen ne komplementa sen "Hamburgo en Retrospektivo", bindita, ilustrita, 876 p., ampleksaj persona kaj tema indeksoj, prezo 84 ned. gld., 215 danaj kronoj aŭ egalvaloro.

HAMBURGO EN RETROSPEKTIVO, konsiderinde kompletigita eldono, broŝurita, 152 p., prezo 5 anglaj pundoj, 70 danaj kronoj, 19 germanaj markoj, 50 fr.fr., 1000 pesetoj aŭ egalvaloro.

Prezoj ekde la 1-a de januaro 1984. Ĉiuj supraj libroj estas en la sama formato de 20,5 x 14 cm.

Mendeblaj ĉe nia "Libroservo de NEM", Nørregårdsvej 91, DK-2610 Rødovre, Danio. Kun escepto de "Esperanto en Perspektivo", la librojn oni povas mendi ankaŭ ĉe la aŭtoro: 77 Grasmere Avenue, Wembley, Middlesex HA9 8TF, Britio, laŭ la prezoj indikitaj en anglaj pundoj.

Krome, unuopaj ekzempleroj de "Hamburgo en Retrospektivo" estas mendeblaj ĉe s-ro Thierry, 5 rue Léon Cogniet, F-75017 Paris, Francio, aŭ ĉe bonaj libroservoj. Pli grandaj kvantoj mendeblaj nur ĉe "ELDONEJO PERSPEKTIVO", Nørregårdsvej 91, DK-2610 Rødovre, Danio, kun jenaj rabatoj: 33% ĉe mendo de minimume 5 ekzempleroj plus 10% por afranko, 33% sen afranko ĉe mendo de minimume 10 ekzempleroj.

En ĉiuj aliaj kazoj bonvolu ĉiam aldoni 10% por la afranko.

LA SUPRAJ VERKOJ DE IVO LAPENNA estas pli aktualaj nuntempe ol iam antaŭe. Ili donas klaran, science bazitan eksplikon pri la esenco de la Internacia Lingvo (Esperanto), pri ĝia rolo en la hodiaŭaj kaj estontaj internaciaj rilatoj kaj pri ĝia monde solidariga funkcio. Samtempe, kune kun la artikoloj en **HORIZONTO**, ili estas la plej trafa respondo al la pseŭdosciencaj skribaĵoj de la sovetismaj ideologoj en la posthamburga UEA kaj ĝenerale en la Esperanto-Movado.

MENDU TUJ KAJ ATENTIGU VIAJN ĜEAMIKOJN

Helpu pluporti la torĉon de la zamenhofa esperantismo ...

LIBROSERVO DE LA NEŬTRALA ESPERANTO-MOVADO
Nørregårdsvej 91, DK-2610 Rødovre, Danio